

N°178  
avril  
mai  
juin  
2017

# LA INFORMILO

N° 178  
aprilo  
majo  
junio  
2017

l'espéranto  
la langue de l'amitié  
sans frontières

esperanto  
France-Est

ESPERANTO  
2017  
*Justa komunikado*

Esperanto  
la lingvo de l'amikeco  
sen landlimoj

## ESPERANTO FRANCE-EST

association culturelle  
pour la promotion  
de la langue  
internationale

### ESPERANTO

regroupant  
les départements

**Bas-Rhin (67)**

**Haut-Rhin (68)**

**Meurthe-et-Moselle (54)**

**Meuse (55)**

**Moselle (57)**

**Vosges (88)**

Maison des Jeunes  
et de la Culture

"Philippe Desforges "

27, rue de la République

**FR-54000 NANCY**

### ABONNEMENT / ABONO

Papera versio: 17€

Reta abono: 7,50€



Ulrich BRANDENBURG



Seán Ó RIAIN



Docteur Vytenis Andriukaitis



Josef REINVART

## Une palette de personnalités politiques espérantophones à Freiburg im Breisgau

Le 94ème congrès de l'association allemande d'espéranto (GEA: Germana Esperanto-Asocio) s'est tenu du 2 au 5 juin 2017 à Freiburg im Breisgau. Les délégués des différents groupes d'espéranto ont pu applaudir le discours du commissaire européen spécialiste de la santé et de la sécurité alimentaire, le **Docteur Vytenis Andriukaitis**, qui avait déjà participé au congrès de l'Association Universelle d'Espéranto à Nitra (Slovaquie) en 2016.

Trois autres personnalités politiques se sont également exprimées en un espéranto parfait: le diplomate irlandais **Seán Ó RIAIN**, président du parti européen EDD (Eüropo-Demokratio-Esperanto), le diplomate slovaque **Jozef REINVART**, ainsi que l'ancien ambassadeur allemand à Moscou, Monsieur **Ulrich BRANDENBURG**.

Ce dernier a été élu lors de ce congrès président de l'Association allemande d'espéranto (Germana Esperanto-Asocio).

# La 69-a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-KONGRESO de la 16a ĝis la 23a de Majo 2017 en Colmar en Francio

Jen ege grava evento okazis en Colmar, la 69a IFEF-kongreso kun la organiza helpo de pluraj asocioj, loka, regiona, faka nacia kaj internacia. Kun membroj de IFEF en Francio kaj eksterlande de FFEA en Francio kunlaboris 3 asocioj, Mulhouse-Espéranto, Espéranto-France-Est kaj la faka asocio TAKE.

Aliĝis al tiu kongreso 147 personoj el 22 landoj. Plej multaj loĝis en la hotelo Primo Balladins en Colmar.

Krome ekde vendrede samtempe okazis la federacio staĝo, kun preskaŭ 20 aliĝintoj.

La kongresanoj ricevis bel-aspektan kongres-libron, ekzempleron de la nova eldonaĵo de TAKE "Konstruado-kajero 2017" kaj libreton en Esperanto pri la fervoja muzeo en Mulhouse.. "



Jen la salut-vortoj aperintaj en la kongres-libro

## Karaj gekongresanoj,

Kiel invitanta loka Esperanto-asocio ni plej kore vin invitas al tiu 69-a kongreso de IFEF en *Colmar*. Pro malekzisto de oficiala Esperanto-grupo en *Colmar*, ni, iom pli sudaj samideanoj de *Mulhouse*, transprenis la kunorganizado de la aranĝo kune kun via jam sperta estraro sub la gvido de via dinamika prezidantino. De pli ol unu jaro la tuta skipo klopodas vin kontentigi per bunta bukedo da fak-prelegoj, asociaj kunvenoj, divers-temaj prelegoj, distraj muzikaj vesperoj kaj kompreneble pluraj ekskursoj, kiuj malkovrigos al vi kelkajn vizitindajn lokojn en nia bela regiono.

**André GROSSMANN - Prezidanto de Mulhouse-Espéranto**



## Karaj gekongresanoj,

La asocio TAKE (Tutmonda Asocio de Esperantistaj Konstruistoj) sidejas en *Wintzenheim*, je kelkaj kilometroj de *Colmar*. Ekde 1993 TAKE promocias la Internacian Lingvon inter la profesiuloj pri konstruado kaj klopodas malkovri en la internacia esperantistaro samideanojn, kiuj pretas verki artikolojn pri sia fako por vivigi nian lingvon en fakaj rondoj.

Dum ĉi tiu kongreso TAKE havas la plezuron donaci al vi pri-kongresan poŝtkarton kaj specialan eldonon de sia jara bulteno KONSTRUADO-kajero 2017 kun temoj, kiuj certe interesos fervojistojn! Unu inter la vojoj al sukceso de Esperanto estas la faka uzo de nia lingvo. Tio daŭre estu nia komuna celo!

**Michel BASSO - Prezidanto de TAKE**



## Karaj gekongresanoj!

Kiel prezidanto de la orientfranca Esperanto-asocio EFE (Espéranto *France-Est*) mi bonvenigas vin plej kore en Alzaco, la plej orienta regiono en nia pli ampleksa orienta regiono de Francio. Por oferti al niaj samideanoj la eblecon praktiki nian karan lingvon en internacia etoso, ni proponis al ili semajnfinan partoprenon. Tiel ili havos la okazon malkovri la laboron de ĉiuj vi, fervojistoj esperantistaj. Dume ni ankaŭ donos al vi la eblecon profiti la servojn de nia riĉenhava libroservo. Ĝuu la kongreson kaj revizitu nin por pli funda turismado en nia regiono.

**Edmond LUDWIG - Prezidanto de Espéranto France-Est**



## Aktive kunlaboris jenaj membroj de FFEA

**Rodica Todor**  
prezidantino de  
IFEF



Jean RIPOCHE

Nome de  
FFEA



Laurent VIGNAUD



Monique GRALL



Jocelyne MILLANVOYE



Jam la 15an de majo en la hotelo Balladins Bernard kaj Andreo komencis prepari la nom-ŝildojn kaj la ekskurso-kuponojn. Poste alvenis Laurent alportante la kongresajn dokumentojn. Nova laboro por enmeti ĉiujn dokumentojn kaj poste aldoni la kongreslibrojn ktp.

En la stacidomo de Colmar deĵoris kelkaj IFEF-anoj por akcepti la alvenantojn.

**Jen kion Daniel Moirand spertis dum tiuj IFEF-tagoj**



**Mardo : 16/05/2017**

Hodiaŭ komenciĝas la IFEF kongreso en Colmar. Ni enrajniĝis en la stacidomo TGV en Aix en Provence por rekte atingi Mulhouse. Post tiu unua veturado, alia trajno (TER) kondukas nin ĝis Colmar. Survoje ni renkontis paron da Hispanoj, kiuj same kiel ni intencas partopreni la IFEF-kongreson. En la stacidomo de Colmar, afabla Laurent atendis kaj akompanis nin ĝis la hotelo *Les Balladins*, centre de la urbo. Aro da geesperantistoj jam troviĝis surloke kaj multaj delonge konataj amikoj bonvenigis nin.

**Merkredo : 17/05/2017**

La postan matenon kuniĝis la loĝantoj de la hotelo por komuna matenmanĝo. Ĉi tiu momento estas aparte agrabla pro abunda kaj diversa elekto da matenaj manĝaĵoj. Inter ili, eblis frandi la famekonatan Kugelhupfon. Poste, oni montris al ni la vojon al la kongresejo, *Les Catherinnettes*, belega kaj vasta loko, kie antaŭe vivis katolikaj fratulinoj. La loko estis bele aranĝita por akcepti renkontiĝojn.

Je la deka okazis la "solena inaŭguro", kiu kuniĝis ĉiujn en la granda halo. Centre de la podio sidis Rodica Todor (prezidantino de IFEF, el Rumanio) kun asesoroj ambaŭflanke de ŝi. Ĉiuj gravuloj parolis pri sia fako kaj fine de tiu unua renkontiĝo, samloke okazis aperitiva kunveno kun multe da alzacaj vinoj kaj kugelhupfo – ĉio tio instigis nin pli bone konatiĝi kun la lokaj tradicioj...

Post komuna foto kaj gazetara konferenco ni retroviĝis liberaj por serĉi manĝolokon. Post tiu devigo, je la 14.30 ni uzis la servojn de loka urba trajneto, kiu veturigis nin tra la urbo, kun klarigoj en la franca.



Post libera paŭzo ĝis la 20.30, ni denove ariĝis en *Les Catherinnettes* por spekti la grupon *Vogesia* de Colmar. Ĝiaj anoj estis vestitaj en regionaj kostumoj laŭ sia geografia deveno. Diversaj lokaj dancoj kaj melodioj plezurigis nin. Tre agrabla vespero, kiu konatigis nin kun la alzacaj tradicioj.

**Ĵaŭdo : 18/05/2017**

Ĉar nia paro ne apartenas al la feliĉa tribo de la Fervojistoj, ĉiuj teknikaj kaj fakaj kunsidoj troviĝis ekster nia persona programo. Ekzemple, de la 9-a ĝis la 12-a okazis ne publika Komitat-kunsido. Ni profitis tiun "liberan" matenon por promeni tra tiu nekonnata (por ni) urbo. Ties malnova parto kun siaj trabfakaj domoj bunte farbitaj impresis al ni. Ankaŭ la muzeo Bartholdi (kreinto de la statuo pri Libereco ĉe le enirejo de la haveno de Novjorko) tre interesis nin.



Je la 10-a okazis la unua esperanto-kurso por komencantoj. Ili daŭros ĝis dimanĉo. Gvidis ĝin Anne kaj Claude Jausions. Posttagmeze okazis du fakaj prelegoj de ĉinaj fervojistoj-samideanoj : Hongwei Zhang kaj de Xu Mingda. La temo estis tre teknika kaj tre interesa por la fervojistoj.



Poste eblis ĉeesti diversajn kunsidojn : prezentadon pri Power Point / FISAIC (far Jean Niemann), movadajn kaj fakajn aferojn.

Oni ankaŭ proponis atelieron pri informadiko.

Je la 20-a., Edmond Ludwig parolis pri sia bone konata Alzaco : tre interesa prelego tre dokumentita el historia vidpunkto. Ĝi ebligis al ni pli bone konatiĝi kun tiu regiono. Ĉi tiun konferencon ni povas legi pere de komputilo.

## EL LA TAGLIBRO DE BAZA ESPERANTISTO EN COLMAR

### Vendredo : 19/05/2017

De la 9-a ĝis la 12-a okazis publika komitatokunsido, kaj samtempe je la 10-a la esperanto-kurso por la komencantoj disvolviĝis.

Je la 14-a, aŭtobuso veturigis nin ĝis Mulhouse por viziti la Fervojan Muzeon – "Cité du train". Kvankam mi ne estas fervojisto, ĉi tiu vizito pasiigis min pro la teknikaj aspektoj de la fervoja sistemo. Miaj (parte) forgesitaj teknikaj konoj revigligis mian junan aĝon, kiam mi laboris sur tiu tereno...

Vespere, Liba kaj Floreal Gabalda prezentis al ni sian filmon, pri vizitado de



Barato per trajno. Tre interesa dokumentita filmo pri la barataj trajnoj kaj maniero tie vivi kaj viziti la landon.

Poste la pola grupo prezentis la urbon Wrocław, kie okazos la kongreso de IFEF venontjare. Bela filmo montris al ni diversajn aspektojn de tiu urbo kun multaj detaloj por instigi al partoprenado.

Poste, Grazia Barboni regalis nin per kanzono en Esperanto.

### Sabato : 20/05/2017

Matene okazas faka kunsido de FFEA (Franca Fervojista Esperanto-Asocio) kaj Faka Komisiono. Ĉi tiun matenon malfermiĝis la libroservo. Ĝi proponis al ni multajn verkojn pri la plej diversaj temoj. Mi profitis la okazon por akiri kelkajn (pezajn) librojn, kiujn mi devos enmeti en la valizojn por veturi hejmen.

Oni vendis oficialan poŝtmarkon : la filatelistoj (kiel mi) bonvenigas tian trafan ideon.

Je la 14-a aŭtobuso veturigis nin al diversaj turismaj vilaĝoj : Kaysersberg (naskiĝloko de A. Schweizer), Riquewihr, Hunawihr kun vizito al la ĝardeno de la papilioj.



Vespere okazis koncerto de Grazia Barboni, kiu interpretis plurajn kanzonojn de Edith Piaf kaj aliajn, akompanante sin per gitaro.

### Dimanĉo : 21/05/2017

Ĉefa fakprelego de Laurent Vignaud enkondukis nin en la dekstra-flankan trafikon en Francio.

Lastfoje malfermiĝis la libroservo kaj okazis la kurso por komencantoj.

La solena fermo okazis tagmeze en *Les Catherinettes*. Posttagmeze la salono de la hotelo akceptis kunvenojn: kunveno de IFEF-estraro kaj LKK, estrarkunsidon de IFEF. Rodica ricevis donace pup-cikonion, kiu kapablas paroli. Ŝi sukcesis paroligi ĝin en Esperanto !...

Vespere Mireille Grosjean rakontis kaj gajigis nin per kelkaj siaj trajnaj aventuroj. Ŝi poste improvizis teatrumadon kun lernantoj dum ŝajna Esperanto-kurso.

### Lundo : 22/05/2017

Dum tiuj tri postaj tagoj okazis la turisma, postkongresa flanko de la renkontiĝo. Ĉi tiun lundon, ni veturis al Strasburgo por la tuta tago. Tie ni ĝuis promenadon sur turisma boato. Ni konatiĝis kun la kluza sistemo laŭlonge de la rivero Ill. La urbo impresas pro sia vasteco kaj komplekseco: ni ripozis en parko, kie impresis nin belegaj grupoj da dikaj arboj Ginko Biloba,



ĉar ni neniam ĝis nun vidis tiajn altajn kaj imponajn arbojn.

Obernai bonvenigis nin per sia preĝejo, tipa fontano/puto kaj... biero.

**Mardo : 23/05/2017**

Vizito de la mirinda kastelo Haut Koenigsbourg : grava milita fortikaĵo kun tre impona milita arkitekturo. Ĝi estis funde kaj bele rekonstruita, restaŭrigita de la Germana Imperiestro Vilhelmo la II-a – ĝi fariĝis simbolo de la germana potenco.

Ribeauvillé impresas per siaj tipaj trabfakaj domoj.

Hunawihr surprizas pro sia bredejo por cikonioj kun ĉiuj detaloj pri la etapoj de ties vivo kaj disvolviĝo. Ankaŭ tie, ni ĉeestis akvan spektaklon kun kormoranoj, lutroj, pingvenoj...

**Merkredo : 24/05/2017**

Lasta tago en Colmar : aŭtobusa vizitado de diversaj vilaĝoj : Eguisheim kaj Ungersheim kun la belega ekomuzeo, kiu prezentas diversajn aspektojn de la antaŭa vivmaniero en Alzaco : domoj, metioj, muziko, muelejoj, kampara vivo... Finfine ĉi tiu kongreso plene sukcesis – ĝi ebligis pozitivan konatiĝon kun Alzaco, kiu estis tute fremda al ni antaŭe. La LKK-anoj bone laboris kaj meritas niajn laŭdojn : ili sukcesigis sian laboron favore al Esperanto, al IFEF kaj al la partoprenantoj.



*Dankon al vi ĉiuj, kiuj donis al ni la eblecon pasigi agrablan semajnon en Esperanta varma etoso !*

*Daniel Moirand Aix en Provence  
18/06/2017*

Korine Cheizoo venis el Nederlando kaj aliĝis al nia regiona staĝo, kiu komenciĝis vendrede en plua tago. Komprenoble ekde tiam ŝi povis ankaŭ ĝui la IFEF-programojn kaj la bieron en Obernai.



**Pri stacidomoj kaj fervojaj vojaĝoj, impresoj kaj spertoj rilate la IFEF-kongreso en Colmar**

Inter multaj interesaj aferoj, mi menciuj kelkajn erojn. Dum faka prelego mi unue lernis, ke la stacidomo de Colmar similas al lokomotivo, fakte pluraj stacidomoj en la mondo same. Tamen por mi restas la stacidomo de Lens, en norda Francio, la plej fama, la plej rekonobla, la plej rekonata, kun ĝia aspekto de granda lokomotivo el grizblanka ŝtono. Tiun stacidomon oni montris, kiam ni buse preterpasis, intence krom-vojumante, survoje dum UK-ekskurso ekde Lilo en 2016. Du-loke la fokusadon al la malsamaj labor-stiloj de tegmentistoj, klare videblaj je stratnivelo. Mi certas ke ĉiuj kongresanoj, kiuj trajne vojaĝis post la kongreso, foriris pli frue al la stacidomo por spekti la tegmentojn kaj kompari la

nordan kaj sudan flankon de la tegmentoj.

Promeninte inter kongresejo kaj hotelo, en la unua parto (vendrede) de la kongreso oni emis serĉi la sunajn flankojn de la strato, poste oni preferis la ombron. Kaj do ni ĝuis tri sinsekvajn tagojn de ekskursado en agrabla vetero, al diversaj vizitindaj lokoj en Alzaco. Interdume mi lernis multon pri trabfakaj domoj, ĉiam videblaj en la diversaj lokoj kiujn ni vizitis en la regiono. Same ni ĉie vidis (kaj aŭdis) la cikoniojn sur siaj nestoj surtegmentaj. Dum ekskurso al la speciala parko de Hunawihr, kie oni montris al ni divers-agajn cikoni-idojn, mi lernis, ke tio rezultas el sukcesa programo de bredado kaj reintregiĝo. Sed vere menciinda estas nia ĉiĉerono, kiu nekredeble multon scias pri la regiono, ĉu fakte, ĉu (art)historie, kaj ŝajne nelacigebla rakontis pri tiuj plej diversaj temoj al ni.



La reĝo de Nederlando kun la reĝino, la reĝidinoj kaj la aliaj (bo)familianoj vojaĝis ĉijare per trajno al la urbo de publika festado okaze de la datreveno de lia naskiĝtago. Tion havis multe da atento en nia lando. Tamen



tiaj kutimoj, veturigi moŝtulojn per fervojoj, ekzistas jam delonge en alia lando: dum la ekskurso al la Fervoja Muzeo en Mulhouse, plena je divers-specaj lokomotivoj kaj vagonaroj el diversaj anguloj de la mondo, mi vidis, kvankam el pasinta jarcento, belegan prezidentan vagonaron de la SNCF, la franca kompanio de fervojoj.

Post la postkongreso, hejmen-irinte el Colmar, mi intence prenis pli fruan trajnon por eliri en Strasburgo. Mi volis dediĉi tempon al spektado la ĉefan stacidomon de Strasburgo. Kelkajn tagojn pli frue nia ekskursiva buso hazarde preterpasis ĝin kiam ni forlasis tiun urbon por viziti la ĉarman urbeton Obernai, kaj ĝi tuj kaptis mian atenton. Ĝi ŝajnas esti kaptita en grandega bobelo de vitro. Jam de ekstere interesa vido, vera surprizo estis ke la vitra aerveziko enhavis la malnovan stacidomon, la vitraj vandoj kvazaŭ protektema galerio. Kia bela maniero samtempe konservi la malnovan histori-plenan konstruaĵon kaj adapti al la bezonoj de la nova tempo, kion postulas rapideg-trajnoj kaj ligoj al urba publika transportado.

Televidile far mi ŝatata programo estas "Rail Away", originala nederlanda produktaĵo. Precipe pro ĝia trankviliga efiko, spektante vojaĝi ekde la sofo, travivi apog-seĝajn aventurojn en mia komforta fotelo hejme. Kontentiga anstataŭigo kiam ne tuj eblas mem sperti: oni montras okul-frapajn aŭ rimarkindajn fervojajn itinerojn divers-kontinente, filmitajn el la



vidpunkto de la stirejo, kie nur la trajnkondukisto deĵoras. Informoj ne nur rilatas al specifa trajno kaj fervojo, ankaŭ apud-trakaj pejzaĝoj, urboj, kulturo kaj historio estas diskutitaj en tiuj dokumentarietoj. Hejme denove post Colmar, mi malrapide konsciiĝas ke mi nun -vera kontrasto al antaŭ-atente sekvas detalojn pri planado, problemoj rilate la konstruado de fervojaj trakoj, kiamaniere konkeri nivel-diferencojn, kaj similaj aferoj. Ĉu efiko de sukcesa 69a IFEF kongreso?



Korine Cheizoo, junio 2017



Aperis en la ĵurnaloj DNA kaj L'Alsace la ĉi suba artikolo la 22.05.2017.

Jean Ripoché et Monique Grall, de la *Fédération internationale des cheminots espérantophones*

## « L'espéranto relie les peuples »

Propos recueillis par Françoise Marissal

La Fédération internationale des cheminots espérantophones tient son congrès annuel jusqu'à ce mardi à Colmar. 145 personnes de 22 pays - dont la Chine, Cuba, l'Espagne, la Suède - y participent.

**Une Fédération internationale des cheminots espérantophones ? En quoi consiste-t-elle ?**

Nous appartenons à l'Association mondiale de l'espéranto située à Rotterdam ; nous sommes une centaine de fédérations dans le monde, nationales ou internationales, des cheminots, scientifiques, constructeurs, des associations politiques, artistiques, des associations de jeunes...

La tâche de notre association est de transposer en espéranto les termes ferroviaires. Chaque année de nouveaux termes ou nouvelles nomenclatures ferroviaires sont créés par l'Union internationale des chemins de fer ; nous les retransposons ensuite en espéranto. Cette année nous avons une trentaine de termes à étudier. C'est aussi l'occasion de se connaître entre cheminots du monde entier, de prendre connaissance de leur situation suivant les pays, par le biais de conférences.

**Que représente l'espéranto aujourd'hui dans le monde ?**

Les estimations varient de 1 à 10 millions de locuteurs, mais 3 millions semble le bon chiffre, et la langue est parlée dans 120 pays. En France, nous sommes à peu près 1 000 personnes. Il y a certains pays où elle est beaucoup plus pratiquée, comme la Chine et la Hongrie.

**L'espéranto vise à être une langue universelle. Pourquoi n'y a-t-il pas plus de monde ?**

Il est certain que notre nombre diminue, et

**COLMAR DNA 21.05.2017**

### Des cheminots espérantophones du monde entier

Venus de 22 pays – Chine, Cuba, Autriche, Lituanie... – des cheminots parlant l'espéranto tiennent congrès à Colmar jusqu'au 23 mai. L'espéranto a été créé en 1887 par un médecin polonais, le Dr Ludwik Zamenhof, dans le but de promouvoir la paix : langue universelle, ne dépendant pas d'une nation, elle évite la domination d'une langue – et donc d'un pays – sur une autre. Et elle est simple à apprendre.



Pour Jean Ripoché et Monique Grall, « L'espéranto est une langue où chacun fait un pas vers l'autre. »

Photo L'Alsace/Françoise Marissal

pourtant le rêve qu'avait eu Ludwik Zamenhof en 1887 d'une langue universelle, est toujours d'actualité : elle permet de relier les peuples sans idée de domination d'une langue sur une autre. C'est une langue où chacun fait un pas vers l'autre ; tandis qu'avec l'anglais, la langue la plus parlée aujourd'hui, vous aurez toujours une domination de celui dont c'est la langue maternelle.

**Qu'est-ce qui explique cela ?**

L'espéranto a souffert de l'histoire : il a eu son heure de gloire au début du XX<sup>e</sup> siècle, mais comme son but était de promouvoir en évitant les problèmes de communication, la Première Guerre mondiale lui a porté un coup terrible. De plus, la langue était particulièrement pratiquée en Allemagne et en Russie ; ses locuteurs

ont été persécutés par les nazis et en URSS.

L'espéranto a pu reprendre après la Seconde Guerre mondiale, mais à ce moment-là, l'anglais s'était imposé... Et les tenants de l'anglais n'ont aucun intérêt à laisser l'espéranto revenir, ils perdraient leur position dominante.

**L'espéranto peut-il rebondir ?**

Qui sait ? On voit les gens se lever contre certains systèmes. Pourquoi ne le feraient-ils pas contre la domination de l'anglais ? L'espéranto est neutre et simple à apprendre ; son vocabulaire est latin, sa structure et sa grammaire sont asiatiques. Et chez les cheminots, nous avons un beau slogan : « la reloj ligas la landojn, esperanto la popolojn. » « Les rails relient les pays, l'espéranto relie les peuples. »


internationales, nationales, professionnelles, culturelles, religieuses... Et donc des cheminots.

Durant ce congrès, ils retransposent en espéranto les nouveaux termes techniques ferroviaires qui sortent chaque année et des conférences permettent de découvrir la situation du rail selon les pays.

F. MA.



« Nous sommes environ 3 millions d'espérantophones dans le monde », indique Jean Ripoché, de la fédération internationale des cheminots espérantophones. L'histoire n'a pas permis à cette langue de prendre son essor, « mais aujourd'hui des gens se lèvent contre des systèmes, pourquoi ne se lèveraient-ils pas contre le système dominant anglophone ? » Au fait, pourquoi des cheminots ? Il existe une centaine d'associations de locuteurs,

<b>Espéranto France-Est</b>		<b>Orient-Franca Esperanto-Asocio.</b>
<b>La Informilo</b>	Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale <b>ESPERANTO</b>	Dulingva inform-bulteno pri la internacia lingvo <b>ESPERANTO</b>
<b>Rédaction: Redaktoro:</b>	Edmond Ludwig kaj André Grossmann	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:	Article manuscrit à éviter Texte envoyé par courriel doc, odt Document avec mise en page (PDF) marges identiques à cette page-ci	un mois 3 semaines 2 semaines avant la fin de chaque trimestre
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.		

Komitato de la Asocio		Comité de l'Association	
Funkcio	Adreso	Telefono	Ret-adreso
Prezidanto + PKK <i>Président + Cours par correspondance</i>	S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR	03.89.77.52.56	esperanto.eludwig@orange.fr
Sekretario <i>Secrétaire</i>	S-ro Robert KUENY 30, rue des Champs 68690 GEISHOUSE	03.89.82.37.62	kueny.robert@neuf.fr
Kasisto - Redaktoro <i>Trésorier - Rédacteur</i>	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	03.69.54.46.93	andreo.ag15@sfr.fr
Libroservo <i>Service Librairie</i>	S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE	03.83.53.57.54	jean-luc.thibias@laposte.net libroservo.efe@laposte.net
Aliaj komitatanoj	S-ino Liliane BERSWEILER	03.83.47.41.36	liliber54@yahoo.fr
Assesseeurs	S-ino Micheline COLNOT	03.83.27.46.93	michelinecolnot@orange.fr
	S-ro Jacques HERLÉ	03.87.01.00.39	jacques.herle@laposte.net
	S-ro Jacques PINEDA	03.89.42.88.54	pineda.ventron@gmail.com
	S-ino Simone KIRY	03.89.57.68.10	
	S-ino Ginette MARTIN	03.29.24.68.46	gimavo@wanadoo.fr
	S-ino Madette AST	03 87 01 32 85 06 70 94 11 84	madette20@hotmail.fr
	S-ino Gisèle BERTAPELLE	03.83.56.17.37 06.80.68.94.78	bertapelle.gisele@wanadoo.fr
	S-ino Catherine HEL	03.83.47.63.07	cathello@laposte.net
	S-ro Yves STUTZ	03.89.39.83.14	stutzyves@gmail.com
	S-ro Gilbert STAMMBACH	03.88.96.67.59	gilbert.stammach@gmail.com

<b>Abono al La Informilo →</b>	17 eŭroj	reta abono: 7,50 eŭroj	← <b>Abonnement à La Informilo</b>
Pagoj per ĉeko je la nomo de →	<b>Esperanto France-Est</b>		← <i>Paiement par chèque au nom de</i>
Pagoj per ĝiro al jena konto →	<b>CCP 1997 72 W NANCY</b>		← <i>Paiement par virement au compte</i>
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM		Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier

1. Kongreso en Frajburgo	15. Enigmo kaj humuraĵoj	<p><b>ISSN 0291 6037 trimestriel</b>  <b>N° CPPAP : 0409 G 83517</b>  bulletin d'information bilingue sur l'espéranto  édité par l'association culturelle  <b>Espéranto France-Est</b>  MJC PhiJippe Desforges - 27 rue de la République  <b>54000 NANCY</b>  Directeur de la publication : <b>Edmond LUDWIG</b>  Rédacteur provisoire : André Grossmann  Dépôt légal : <b>30 septembre 2013</b>  Imprimé par l'imprimerie Sprenger</p>
2. IFEF-kongreso en Colmar	16. Restado en Metabief	
3. IFEF-kongreso en Colmar	17. En Metabief+ Greziljono	
4. IFEF-kongreso en Colmar	18. Luminesk + Amika tago	
5. IFEF-kongreso en Colmar	19. Staĝo enSchwäbisch Gmünd	
6. IFEF-kongreso en Colmar	20. Staĝo enSchwäbisch Gmünd	
7. IFEF-kongreso Gazetoj	21. Nia vilaĝo	
8. Komitatanoj kaj Menuo	22. GEA-kongreso Frajburgo	
9. Angulo de la prezidanto	23. GEA-kongreso Frajburgo	
10. Libroj	24. Vojaĝo en Barato	
11. Fremdulino - Muzeo	25. Fervojo en Barato	
12. Libro-servo	26. Fervojo en Barato	
13. Libro-servo	27. Fervojo en Barato	
14. Ni ridu pri klaĉo en Colmar	28. Fotopaĝo kongresaj sakoj	



## Karaj gesamideanoj



Pro sinsekvaj Esperanto-aranĝoj en nia regiono (IFEK-kongreso en Colmar kaj Germana Esperantokongreso en Freiburg im Breisgau), kiujn partoprenis pluraj federacioj kaj en kiuj pluraj gesamideanoj estis envolvitaj kaj agadis plej streĉe, ni okazigis nian jaran devigan membrokunvenon nur la 17-an de junio 2017 en Schwabwiler, Hôtel de la Poste. Bedaŭrinde partoprenis nur deko da federacioj. Ŝajnas, ke la malemo al administraj aferoj ankaŭ atingis la Esperanto-movadon! La kunveno disvolviĝis en agrabla etoso.

Post la kunveno ni veturis al la apuda Betschdorf, kie ni rememorigis pri nia kara forpasinta Esperanto-avinjo Odette SCHEIDEL en la tiea tombejo, kie nin atendis germanaj geamikoj de Odette, gesinjoroj Kleemann el Rastatt. Renaskiĝis memoroj pri la agad- kaj gastigemo de Odette dum la tridek jaroj de ŝia agado.

Ŝi ne plu estas inter ni, sed ŝi restu modelo de agado por ni ĉiuj. Same modele agadis du aliaj forpasintoj karaj al ni: Pol Denis kaj Jean-Paul Colnot. Ni ilin ne forgesu!

E.L.



Atingis nin la informo de BAVELO pri la forpaso de samideanino Irmtraud Bengsch el Konstanz, pionira germana kunlaborantino de Esperanto France-Est (tuj post la Dua Mondmilito), tiama Fédération culturelle de l'est pour l'espéranto. Daŭre ŝi agadis por francgermana amikeco. Viglis la renkontiĝoj franc-germanaj sub gvido de Jean-Paul COLNOT. Ni kondolencas plej sincere.

Mikaelo BRONŜTEJN koncertis en Strasburgo

Kadre de la prelegvojaĝoj organizataj de Espéranto-France la grupo de Strasburgo gastigis la dekkvinan de majo la vaste konatan bardon kaj verkiston Mikaelo BRONŜTEJN. Dekkvino da samideanoj atenteme aŭskultis liajn kanzonojn, poeziaĵojn kaj rakontojn pri ties eventoriĉa vivo, ekde la pluretna Ukrainio ĝis la internaĵoj de nia tero en karbonminejoj de la plej ekstrema nordo de Rusio, kie dum tri kvaronoj de la jaro regas nur blanko kaj nigro. Kaj poste: reveno al Tiĥvin, kie komenciĝis streĉa serĉado de vivrimedoj post la disfalo de Sovetunio. Sed bonŝanacas poetoj/verkistoj/bardoj: ili kapablas fuĝi en siajn revojn! Tiel Mikaelo nin regalis per eltiraĵoj de siaj verkoj.

E.L.

**El la „Verda Biblio“ Izrael Lejzerowicz**

LIBRO-MONDO kaj Grafokom Ŝwidnik – ĉurĉevac 2014


La Bibliion – vi tion scias – ne eblas legi leĝere! Ĉiu leganto de biblia versiklo ja devige komencas cerbumadon pri la legitaĵo, ĉu ne? Kaj skoloj de eksegezistoj eĉ dum jarcentoj disputas pro la signifo de tiu aŭ tiu ĉi dia diritaĵo!

Tion Izrael Lejzerowicz (1901-1942), la aŭtoro de tiu satiro, ne postulos de vi! Akravidecon vi tamen bezonas, almenaŭ se vi ne tuj konsultas la librofinajn klarigojn! Vi prefere kvize diveni, kiuj sin kaŝas malantaŭ personaj nomoj kiel Andreo Apud, Os-briko, Kafo Alt, ktp... Sed nur se vi estas vera esperantisto, kiu studis la historion de nia movado, kaj ne simpla uzanto de la Internacia Lingvo, vi kapablos kompreni la diversajn aludojn al veraj okazintaĵoj en tiu satira rakonto. Kaj tiam vi ĝuegos ĝin!

En la 63-paĝa belaspekta libreto (kiel tio kutimas ĉe libroj “produktataj” de Tomasz Chmielik) vi ankaŭ trovos KD-on kun registraĵoj. Legas la bedaŭrinde tro frue mortinta aktoro Jerzy Fornal, kies esprimplena voĉo vin ravis en ĉi tiuj registraĵoj de Varsovia Vento.

En dua parto vi ankaŭ malkovros kelkajn rakontojn sub la ĉeftitolo *Babiladoj kun Horaĉo Serĉer*. Iuj eĉ tragike anoncas la kruelan destinton de Izrael Lejzerowicz kaj ties familio. Pri la aŭtoro vi ekscios en la postparolo de Tomasz Chmielik.

el

**Georges KERSAUDY (1921-2015) André CHERPILLOD Eldono La Blanchetière 2015**

Dulingvan libreton (Esperanto – franca) omaĝe al la franca lingvokapablulo Georges KERSAUDY verkis André CHERPILLOD. En nur 16 paĝoj la aŭtoro portretas homon, kiu dediĉis siajn longajn vivjarojn al la lingvoj. Li komprenis kvindek da ili kaj multajn parolis flue. Kiel dekkvinjarulo li malkovris, ke Esperanto estas bona ŝlosilo por malfermi al si la pordojn al amaso da lingvoj. Kaj ju pli da ili oni parolas, des pli facilas la aliro al novaj lingvoj. Certe, li havis eksterordinaran memoron kaj kapablon, kio malfermis al li karieron en la Ministerio pri Eksterlandaj aferoj kaj en UNO (Unuiĝintaj Nacioj).

Nepre legu tiun ĉi libreton, donacu ĝin al viaj konatuloj (**ĝi ja estas dulingva**). Kia efika reklamilo por nia lingvo kaj por lia franclingva verko **Langues sans Frontières Georges Kersaudy Editions Autrement Frontières**. Nur ??????

**Heredantoj de silentado Sabine Dittrich Kava Pech 2017 (Traduko el la germana)**

Romanforme la leganto iom post iom malkovras historiajn eventojn pri kiuj necesas diri, ke ili ĝis nun restis silentigitaj sufiĉe vaste: la rilatoj inter ĉeĥoslovakoj, germanoj kaj judoj antaŭ, dum kaj post la Dua Mondmilito. Pere de juna juddevena germanino, kiu enketas pri geavoj malaperintaj en naziaj koncentrejoj, ni malkovras la sorton de germanoj kaj judoj, kiuj vivis de jarcentoj en la teritorio de la tiama Ĉeĥoslovakio kaj kies rilatoj kun la ĉeĥa loĝantaro malboniĝis ĝis ambaŭflanka malamego pro la nazia sistemo. Kaj fine de la milito la germanoj estis tre ofte kruele elpelitaj el la lando, en kiun tiam enmarŝis la soveta armeo.

La aŭtorino Sabine Dittrich mem spertis la eventojn en sia familio, sed la rolantoj estas inventitaj. Tamen veras la historia fono. La leganto rapide malkovras, ke ne eblas juĝi laŭ nigra-blanka vidpunkto. Kaj: kial plurajn jardekojn poste juna germanino kaj juna ĉeĥo ne sin amus kaj eĉ geedziĝus?

## La fremdulino. . . !!.

Kelkajn jarojn antaŭ mia naskiĝo, mia patro konatiĝis kun fremdulino ĵus alveninta en nian vilaĝon. Ekde la komenco, mia patro estis konkerita de tiu persono, tiel ke ni juĝis taŭga inviti ŝin restadi ĉe ni. La fremdulino akceptis kaj, ekde tiam, ŝi estis anino de la familio.

Sed la fremdulino estis rakontemulo, ĉarm-uzanto. Dum horoj, ŝi fascinis nin dank'al siaj misteraj aŭ komikaj rakontoj.

Ŝi respondis por ĉio, kio koncernis politikon, historion aŭ sciencojn.

Miaj gepatroj estis instruistoj: mia patrino instruis al mi, kio estas bono, kaj kio estas malbono, kaj mia patro instruis al mi obeemon.

La fremdulino sciis ĉion pri pasinteco, pri nuntempeco, ŝi preskaŭ povintus paroli pri estonteco.

Ŝi eĉ spektigis al mia familio futbalmatĉon por la unua fojo.

Ŝi ridigis min kaj ŝi plorigis min.

La fremdulino paroladis senĉese; tio ne perturbis mian patrinon. Kelkfoje, Panjo leviĝis, sen averti, dum ni daŭre glutis la parolojn de la fremdulino. Mi opinias ke, en la realeco, Panjo troviĝis en la kuirejo por esti iom trankvila.

(Nun, mi demandas min, ĉu ŝi ne senpacience esperis, ke ŝi foriru.)

Mia patro havis siajn moralajn konvinkojn, sed la fremdulino ŝajnis ne esti koncernata de tio.

La blasfemojn, la aĉajn parolojn, ekzemple, neniu ĉe ni, nek najbaroj, nek geamikoj, estus permesintaj tion al ŝi.

Ne estis la kazo de la fremdulino, kiu havis ĉiujn rajtojn, ofendante mian patron, kaj ruĝigante mian patrinon.

Mia patro tute malpermesis al ni alkoholon. Ŝi, la fremdulino, instigis nin trinki ĝin ofte.

Ŝi asertis al ni, ke la cigaredoj estas freŝaj kaj sendanĝeraj, kaj ke fumi pipon aŭ cigaron aspektas ŝike.

Ŝi parolis libere (eble tro) pri sekso. Ŝiaj komentoj estis evidentaj, sugestaj, kaj ofte diboĉaj.

Nun, mi scias, ke miaj rilatoj estis forte influitaj de tiu fremdulino dum mia adoleskanta aĝo.

Ni kritikis ŝin, ŝi ne atentis pri la valoro de miaj gepatroj, kaj, malgraŭ tio, ŝi ĉiam estis hejme.

Dekoj da jaroj pasis de post nia foriro de la patra hejmo.

Kaj, ekde tiam, multaj aferoj ŝanĝiĝis: ni ne plu estas tiom fascinataj.

Tamen, se vi povus eniri ĉe miaj gepatroj, vi retrovus ŝin en iu angulo, atendante ke iu venu aŭskulti ŝian babiladojn aŭ dediĉi al ŝi sian liberan tempon.

Ĉu vi volas koni ŝian nomon? Nu, ni nomas ŝin. . . Teledidilo!

Necesus, ke tiu bela historio estu legata de ĉiuj.

Atenton: Nun, ŝi havas edzon, kiu nomiĝas Komputilo. . . , filon, kiu nomiĝas Poŝtelefono. . .

filinon, kiu nomiĝas Tabulkomputilo. . . kaj nevon pli aĉan ol ĉiuj: Li estas Smartfono. . . kaj ili ligiĝas ĉiuj kune, por forigi nin unuj de la aliaj. Teksto trovita sur la reto tradukita de Catherine Roux-Harelle, kun la helpo de Ginette MARTIN

La Trajno-Centro de Mulhouse – Cité du Train

**Dudek-kvar-paĝa informbroŝuro** eldonita okaze de la 69-a IFEF-kongreso 2017 en Colmar (Francio) estis eldonita ege interesa broŝuro, kiu prezentas resuman historion de la fervojo en Francio kaj en aliaj eŭropaj landoj. Jen bonega enkonduko al la vizito de ĉi tiu vizitinda muzeego.

Broŝuro havebla en la Libroservo de EFE.

**Vizitoj :Cité du Train 68200 Mulhouse (Francio)**

**Tel. 03 89 45 83 33 Retejo: [www.citedutrain.com](http://www.citedutrain.com)**

IFEF eldonis Esperant-lingvan 24-paĝan broŝuron pri la fervoja muzeo de Mulhouse.

Ĉiu kongresano ricevis ekzempleron.

Nia asocio ankaŭ ricevis iom da ekzempleroj.

Eblas ricevi ekzempleron afrankitan por 2 eŭroj.





# El nia libroservo



## Informoj

⇒ la libroservo partoprenos la venontan komunan regionan staĝon en Schwäbisch Gmünd la 6/8ajn de oktobro 2017. Multaj el niaj 700 libroj kaj kasedoj atendos vin!

La listo de la libroj aĉeteblaj ĉe nia libroservo aperas en la retejo de Esperanto France Est (<http://esperanto.france.est.free.fr>). Se iu precipe allogas vin: avertu min per retmesaĝo, mi nepre kunportos ĝin (sed vi ne estos devigata aĉeti ĝin)!

Ĝis baldaŭ!

Jean-Luc Thibias

libroservo.efe@laposte.net



## Novaj libroj



①



②



③



④

**1. Home en senhomeco**, Militaj impresoj, **Martin Stuppig**, *Kava Pech*, 2016, 192 paĝoj. **13,50 €**.

Martin Stuppig, fervora fervojista esperantisto kaj mondvaganto, rakontas sian sperton pri la milito, kiel soldato, precipe en Monte Cassino, kaj kiel kaptito. Nun Martin Stuppig daŭre estas vigla kaj aktiva esperantisto kaj partoprenis la ĵus okazintan IKEF kongreson en Colmar.

**2. Amo inter ruinoj**, Romano, **Trevor Steele**, *F.E.L.*, 2016, paĝoj. **16 €**.

En 1990-1991, kiam Sovetunio ŝanceliĝas, Aŭstraliano kaj Estonino amikiĝas. Ĉu ili povos trovi feliĉon?

**3. Promenante tra la lingvoj**, lingviko, **André Cherpillod**, *Blanchetière*, 2017, 132 p, **10 €**. Komparo de lingvoj pri gramatikaĵoj, konjugado...

**4. Spirita revolucio en la koro de Eŭropo**, religio, **Premysl Pitter**, *Pech*, 2017, 128p, **12 €**. Prezento de la agado kaj pensado de diversaj ĉekaj religiuloj tra la jarcentoj.

### Por mendi librojn:

1. Vi sendas vian mendon

- per poŝto al : Libroservo 37 RUE PIERRE ET MARIE CURIE 54500 VANDOEUVRE
- per ret-poŝto al "libroservo.efe@laposte.net"
- nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54. Nur post la 20a horo.

2. Vi baldaŭ ricevos viajn librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj)

3. Vi pagas vian fakturon per poŝta ĝiro al "libroservo 2800-76 H NANCY" (indikinte sur ĝin la numeron de la fakturo), aŭ per mandato aŭ ĉeko je la nomo "libroservo" sendita al la adreso de la libroservo.

Eksterlandanoj povas sendi internacian ĝiron al "LIBROSERVO"

**IBAN** : FR 98 20041 01010 0280076H031 97

**BIC** : PSSTFRPPNCY., indikante en la koresponda linio la numeron de la fakturo.

<i>Mendilo</i>		Bonvolu sendi tiujn librojn al apuda adreso:
S-ro / S-ino		
En	la	Subskribo:



## Nenovaĵoj, ĵus alvenintaj:



1



2



3



4



5



6

1. **La dresdena Sinjorina preĝejo**, Historio, Helfricht, *Kava Pech*, 2006, 86 p, 12,90 € . la katedralo.
2. **Heredantoj de silentado**, romano, Dietrich, *Kava Pech.*, 2013, 144 p, 15 € . malkovras doloran gepatran pasinton.
3. **Konciza historio de Kristanismo**, , Gerrit Berveling, *Kava Pech.*, 2014, 90 p. 8,70 €.
4. **Kristnaskaj demandoj kaj paradoksoj**, , Maks Kaŝparu, *Kava Pech.*, 2010, 20p, 1,80 €.
5. **U.E.A. en konscio de Esperantistoj**, , Zbigniew Galor, *Kava Pech*, 2015, 84 p. 15 €.
6. **Kumewawa, le fils de la jungle**, infanlibro, Tibor Sekelj, *D.E.C.*, 2015, 82 p, 20 €. el esperanto.



7



8



9



10



11



12



13



14



15



16



17

7. **Alfabetoj de l' mondo**, Lingviko, Cherpillod, *La Blanchetière*, 2016, 98 p, 6 € .
8. **Enciklopedieto de esperanto**, Movado, Cherpillod, *La Blanchetière*, 2015, 156 p. 10 €.
9. **Esperanto : evoluo kaj degenero**, , Cherpillod, *La Blanchetière*, 2014, 90 p. 8,70 €.
10. **Etimologiaj vagadoj**, , Cherpillod, *La Blanchetière* 2012, 138p, 10 €.
11. **Franc slango**, , Cherpillod, *La Blanchetière*, 2013, 66 p. 4,50 €.
12. **La FUNDAj koMENTOj**, lingviko, , *La Blanchetière*, 2013, 110p, 7,50€. Kolekto de lingvaj artikoloj.
13. **Leksikaj vagadoj**, lingviko, Cherpillod, *La Blanchetière.*, 2012, 80 p, 6 € .
14. **Prepozicioj, tranzitiveco : la ĝusta uzado**, , Cherpillod, *La Blanchetière.*, 2015, 24 p. 2 €.
15. **Kristnaskaj demandoj kaj paradoksoj**, , Cherpillod, *La Blanchetière*, 2010, 20p, 1,80 €.
16. **La refleksivo en esperanto**, , Cherpillod, *La Blanchetière*, 2012, 12 p. 1,50 €.
17. **Volapuko en 10 lecionoj**, Instrulibro, Cherpillod, *La Blanchetière*, 2016, 68 p, 6 €.



18



19



20



21



22



23



24



25



26



27



28



29



30



31

18. **Bulonjo ĉe Maro**, Movado, Cherpillod, *La Blanchetière* , 2016, 62 p, 6 € .
19. **Cyrano de Bergerac**, Teatraĵo, Rostand, *Fonto.*, 2013, 250 p, 15 € . de André Cherpillod.
20. **De Mazdaismo ĝis katarismo : la dualismaj religioj**, , Cherpillod, *La Blanchetière.*, 2014, 40 p. 3 €.
21. **La domo Tellier**, , de Maupassant, *La Blanchetière.*, 2016, 52p, 4,50 €.
22. **Georges Kersaudy**, , Cherpillod, *La Blanchetière*, 2015, 16 p. 1,50 €.
23. **La laksigo de Bebo**, teatraĵo, , *La Blanchetière*, 2010, 64 p, 5 €.
24. **Mensogoj kaj sekretoj de la historio**, historio, Cherpillod, *La Blanchetière.*, 2015, 174 p, 12 € .
25. **Mikromego kaj aliaj verkoj**, , Voltero, *Fonto.*, 2014, 216 p. 15 €.
26. **Richard Wagner, lia vivo, lia verkaro**, , Cherpillod, *La Blanchetière*, 2013, 146p, 12 €.
27. **La signo kaj aliaj rakontoj**, , Guy de Maupassant, *Fonto*, 2013, 162 p. 15 €.
28. **Tartufo**, ĵo, Moliero, *Fonto*, 2012, 124 p. 12 €.
29. **La templanoj : iliaj misteroj, iliaj sekretoj**, , Cherpillod, *La Blanchetière*, , 2015, 62 p. 5 €.
30. **La trudita edziĝo**, Teatraĵo, , *La Blanchetière*, , 64 p, 50 €.
31. **Katekismo de la honesta homo**, Filozofia dialogo, , *Fono*, 2012, 66 p, 6,90 €.

## Ni ridu pri iuj kongresaj (mal)seriozaj klaĉaĵoj

Skribas Laurent Vignaud.

**Karaj IFEF-kongresintoj en Colmar !** (+ kelkaj aliĝintoj, kiuj bedaŭrinde devis rezigni partoprenon) La 22an de majo finiĝis la 69-a IFEF-kongreso en Colmar. **La LKK vin dankas** pro via partopreno kaj informas, ke la **oficiala nombro de kongresanoj estas 170 aliĝintoj el 21 landoj**.

**La LKK ankaŭ esperas, ke vi ĉiuj estas kontentaj pri la kongreso.**

### La LKK zorgis pri via sano !

Interkona vespero okazis sen alkoholaj trinkaĵoj... kaj eĉ sen trinkaĵoj ! En alia tago, je matena pinthoro, kiam multaj iris al/el la matenmanĝejo, lifto ne funkciis... tio certe devigis vin ŝtuparumi... ! :-)

### Kelkaj fuŝetaĵoj :

Jes ja, estis kelkaj, malgraŭ ĉiaj klopodoj de la LKK, sed ĝi solene promesas kaj ĵuras al vi, ke tiuj fuŝaĵoj ne re-okazos dum la venonta IFEF-kongreso en Colmar ! :-)

Unua fuŝaĵo temis pri la **mapo dissendita**, pri kiel atingi la kongresejon. La malkompetenta LKK forgesis indiki, ke por uzi mapon, kelkfoje necesas turni ĝin. Iu kongresano, ne informite pri tio, bedaŭrinde ekpaŝis el la stacidomo, forgesis turni sin maldekstren (al la urbocentro) kaj senutile paŝis 2-3 kilometrojn... (tamen, sporto estas bona por bona sano...). Eble en iu venonta IFEF-kongreso estos ateliero, pri kiel uzi mapojn... Instruemuloj kaj lernemuloj sin anoncu! :-)

Dua fuŝaĵo kuŝis en la **mankantaj tradukoj** dum la folkloro spektaklo de la grupo "Vogésia". La franclingvajn danc-indikojn oni ja tradukis en Esperanton, sed ne en la bulgaran, ĉeĥan, danan, germanan, hispanan, hungaran ktp. Pro tiu maldiligenteco de la LKK aŭdiĝis plendeto... Eble en iu venonta parolado, la prezidantino klarigu al la kongresanoj, kio estas Esperanto... kaj instigu la ne-Esperanto-parolantojn partopreni en la Esperanto-kurso! :-)

Alia fuŝaĵo, vera, temis pri **skribaĵoj**.... Ĉu vi rimarkis la nomojn kaj ĉefe la funkciojn de la personoj, kiuj dum-inaŭgure sidis sur la podio? Sur la etiketoj iliaj funkcioj estis skribitaj franclingve! Tamen, tiu fuŝetaĵo, vera, ne naskis plendojn! Notinde ankaŭ, ke anoncita sur la podio estis S-ino Vito Tornillo. ! :-)

Alia fuŝaĵo estis la **"iom" malgrandaj dormoĉambroj**. Klaĉema kongresano diris, ke *"oni estu fleksibla, kiel serpento"* kaj ke *"oni eniru nuda en la banĉambrojn"*! Alia partopreninto konfesis, ke *"la urbocentro ja estas proksima kaj hotel-prezroj negrandaj, tamen ĉambroj estas tro malgrandaj..."*. Do rekomendo de la Colmar-LKK al estontaj LKK-oj estas, ke al la kongresanoj oni proponu kongres-hotelon en la urbocentro mem, malmultekostan, kun grandaj ĉambroj, laŭeble najbaran al stacidomo kaj al flughaveno, kaj ankaŭ kun inkluzivita matenmanĝo, kaj ankaŭ najbaran al la kongresejo, kaj ankaŭ najbaran al senpaga aŭto-parkejo, kaj ankaŭ najbaran al turismaĵoj, kaj ankaŭ..... :-)

### Malfacila organizado :


Vi certe konscias, kiel malfacile estas organizi IFEF-kongreson. Oni eĉ raportis, ke la hotelestrino diris, ke *"neniam antaŭe ŝi vidis tiel ĥaosan grupon"*, kun multaj lastmomentaj ŝanĝoj kaj nuligoj de mendoj! Venis ankaŭ kongresanoj... kiuj ne estis en ŝia listo aŭ kiuj ne volis pagi, ktp. Feliĉe, Andreo kaj Jean, plej gratulindaj, sukcesis solvi ĉiujn problemojn (ne ĉiam facile, ili foje pasigis horojn por sukcesi .. :-). Sed bonŝance por helpi al organizado de eventoj ekzistas profesiuloj. Antaŭ la folkloro spektaklo, muzikisto diris, ke la dancistoj dancos samnivele, kiel la publiko... do la LKK formetis 5 vicojn da seĝoj... Momenton poste alvenis dancistino, kiu diris, ke la gedancistoj dancu sur la scenejo, por ke ĉiuj en la publiko bone vidu ilin... do la LKK remetis 5 vicojn da seĝoj ! Kion farus la amatoroj sen la konsiloj de profesiuloj ?!!! :-)

### Senhonte...

Probable la unuan fojon en la IFEF-historio, eble ankaŭ en la tuta historio de Esperanto, LKK senhonte invitis al ekskurso kun grava atentigo, ke oni vidos nenion!! Temis pri la vizito al la stacidoma turo. La LKK atentigis, ke post grimpadado de pli ol 120 ŝtupoj, oni vidos neniun panoramon... kaj jes ja, la 5 kuraĝuloj, kiuj grimpis, povas atesti, ke ili vidis absolute neniun panoramon, nek al la urbo, nek al la trakoj ! :-) jen tio, kion oni vidas :



## Ni lernu per enigmoj kaj distraĵoj



*Ni ridu*



Du amatoraj ĉasantoj ĉasas alkon en Kanado. Ili venis per aŭtomobilo, lasis ĝin apud lago, kaj poste iris piede dum unu horo.

Subite, ili ekvidas alkon, pafas, kaj la alko falas, mortinta.

Granda problemo : Kiel porti ĝin al la veturilo?

- Ni tiru ĝin per la vosto, tio estos la plej bona maniero.

Ili tion faras, sed ne iras rapide, ili multe ŝvitas kaj la veturilo estas ankoraŭ malproksima...

- Stultuloj, diras loka ĉasisto, kiu pasas apude. Vi ne tiras ĝin bone. Vi devos tiri ĝin per la kornoj, tiel la haroj de la besto estos en ĝusta direkto, kaj ĉio iros glate.

Ili decidas fari tiel, kaj post momento :

- Tiu viro pravis, estas nun multe pli facile, sed kial ni estas pli kaj pli malproksimaj de la veturilo ?

Dum procezo, la juĝisto demandas al atestantino, tre eleganta virino:

- Ne forgesu diri la tutan veron. Kiu estas via aĝo?
- Mi aĝas 25 jarojn kaj kelkajn monatojn?
- Bonvolu diri kiom da monatoj.
- 258 monatojn

### HORIZONTALE

1. Reporter'.
2. Helena nimfo. Regnokodo de Peruo.
3. Antikva kimrian'. Bleki kiel tigro.
4. En senfina maniero. Verba finaĵo.
5. Politik' kiu celas konservi aŭtomecon de landparto.
6. Vertebra kolumn'. Japana teatr'.
7. Malutil'. Pez'.
8. Arkta vulpo.
9. Prepozicio. Ĉifris.

### VERTIKALE

1. Aparta ludkart'. Legom'.
2. Korpa kanaletto.
3. Ekzilo.
4. Senvenena serpent'.
5. Sufikso. INVERSE: ŝarĝaŭt'.
6. Francia region'. INV: vicmontra numeralo.
7. Sugest'.
8. Verda ĝermo sur branĉo. Pronomo.
9. Metafizika teori'. Kava profunda spac'.

Viro revenas de sia laboro pli frue ol kutime, kaj li trovas tri glasojn sur la tablo de la kuirejo. Videble iuj trinkis brandon.

Li vokas sian malgrandan filon :

- Ho, ĉu venis vizitantoj ĉi posttagmeze?

- Jes, viro venis kaj patrino servis al li malgrandan glason da brando .

- Sed kial tria glaso ?

- Estis por mi! Mi trinkis ĝin !

- Kaj vi ne estis malsana?

- Tute ne! Sed panjo kaj la viro ne sentis sin bone, ili devis kuŝiĝi.

SOLVO de la KVE de La Informilo 177 :

#### Horizontale:

1.NAJTINGALO. 2.EK. IGI. TIM. 3.ASTENOFERO. 4. TER. OBOLO. 5.ELITRO. 6.BRA. REMI. 7.DRUIDO. RAN. 8.IEN. OSMOZO. 9.TFAN. TO. UM. 10.ESLAV. VOTO.

#### Vertkale:

1.NEATENDITE. 2.AKSEL. REFS. 3.TRIBUNAL. 4. TIE. TRI. NA. 5.IGNORADO. 6.NIOBO. OST. 7.FO. MOV. 8.ATELIERO. 9.LIRO. MAZUT. 10.OMO. BINOMO.

## Restadado de la 19a ĝis la 26a de aŭgusto 2017 en Métabief en la Alt-jûraso kun aŭ sen staĝo de esperanto

### Gastejo

“Les Sapins de l'Amitié” (La Abioj de l'Amikeco) estas ĉaledo, kiu kapablas akcepti 80 homojn (grupojn, familiojn...) tutjare.

Ĝi situas en la centro de Métabief, mezmontara skiejo, apud la svisa limo.

La gastiga skipo (dungitoj kaj bonvolemluloj) akceptos vin kaj zorgos pri via restado en 4, 6 aŭ 12-litaj dormoĉambroj ĉe la 1a aŭ la 2a etaĝo.

Estas ankaŭ granda teraso kaj ĝardeno (4000 m<sup>2</sup>)

Nia kuiristo kuiras bonkvalitajn manĝojn kaj proponas adaptitajn manĝojn laŭeble.

Purigado de la manĝilaro estas mane farita de la feriantoj mem (amika kaj muzika etoso!).

Same ni bezonos vin por pretigi kaj malpretigi tablojn.

**Partoprenantoj, kiuj deziras pli da komforto, rezervos hotelon aŭ alian gastejon.**

**Ili povas nur tagmanĝi kaj vespermanĝi kun la aliaj partoprenantoj en la ĉaledo.**

**Eblos restadi nur kelkajn tagojn**

### Aktivĵoj ( decidu je la komenco de la restado)

- Malkovro de la regiono: piedmigrado, ĉia-terena biciklo, aŭto, ski-kajuto. ĝia faŭno et flaŭro
- Akvaj sportumado ĉe la lago de Malbuisson: naĝado, pedal-boato, ... arbar-aventurejo, bovlingo. somersledo.
- Vizitoj: Fromaĝejo, alkohol-produktejo, Thuyé (fumejo de ŝinko kaj kolbaso), sonoril-fabrika, Château de Joux (kastelo), Natur-rezerveja domo de lago de Remoray, Montara muzeo en La Chapelle des Bois, duatlona trenejo, ski-saltejo, fonto kaj akvofalo de la rivero Doubs, Citadelo de Besançon, Salejoj d'Arc et Senans kaj Salins-les-Bains, Grotjo de Vallorbe, ktp.

Tri nivelaj kursoj eblas: Komencantoj / komencintoj, Progresantoj, Paroliga kurso

Disvolviĝo de la restado kun kurso:

Sabaton 19-an: akcepto posttagmeze, aperitivo

Dimanĉon 20-an: eko de la kursoj


Semajne

- 8a- 8a45: matenmanĝo
- 9a15-12a: kurso ( paŭzo je la 10a30)
- 12a30-13a15: tagmanĝo
- 14a-17a: agadoj
- 17a15-18a30: kurso aŭ agado
- 19a15-20a: vespermanĝo
- 20a30: vespero ( luda, festa...)

Disvolviĝo de la restado sen kurso: bonvolu ĉeesti akurate la manĝojn, Pikniko por tagmanĝi eblas.

Kursfino kaj agad-fino: vendred-vespere

Fino de la restado : sabaton la 20an post la tagmanĝo.





**Bulletin d'inscription / aliĝilo**

à renvoyer avant le 20/7/2017, après cette date majoration de 30€

sendu ĝin antaŭ la 20a de julio 2017 (post tiu dato + 30 €)

à / al Anne-Marie FERRIER 20 rue de la Chesnaie

FR-71530 FRAGNES - LA LOYERE Tél : 336 78 45 60 49

ou/ aŭ Vincent GERBE 40 Chemin des Peupliers FR69300 CALUIRE

Courriel : stagemetabief@orange.fr

<p><i>Pour inscrire une famille, inscrivez chaque personne séparément</i></p> <p>Nom (familia nomo) : Prénom (persona nomo) : .....</p> <p>Adresse (adreso) : ..... .....</p> <p>Pays (lando) : ..... Téléphone (telefono) : kun landokodo: ..... .....</p> <p>Adresse courriel (retadreso) : .....</p>	<p><b>Hébergement du 19 au 26 août 2017</b></p> <p>Restado-kosto de la 19a ĝis la 26a de aŭgusto 2017 280 € 7 nuits par personne/ 7tranoktoj por unu persono</p> <p>Pour les personnes ne logeant pas au chalet Por la personoj sen tranoktado en la ĉaledo sed nur manĝoj 200 €.</p> <p>2 repas/jour par personne (2 manĝoj tage por unu persono) 60 € Participation au stage d'Espéranto Partopreno al la staĝo de Esperanto</p> <p>Inscription après le 20 juillet (aliĝo post la 20a de julio) + 30 € Séjour de qq jours seulement restado dum nur kelkaj tagoj 42 €/tage Précisez les dates/ Indiku la tagojn</p>
---	--

L'hébergement comprend: la nuit, le petit déjeuner et 2 repas avec boissons.

La restado-kosto entenas: tranoktadojn, matenmanĝojn kaj 2 manĝojn tage kun trinkaĵoj.

**Pratique alimentaire/ Manĝo-preferoj**Je mange de tout  Végétarien  Végétalien  Sans porc Mi manĝas da ĉio  Vegetarano  Vegano  Sen porkaĵo 

Pour les cours d'Espéranto, notez le cours suivi - elektita kurso

Débutant  Perfectionnement  Conversation Komencinto  Progresantoj  Konversacio **Je paie 100€ à l'inscription et le reste pendant le séjour****Mi pagas 100€ ĉe la aliĝo kaj la ceteron dum la staĝo****Par chèque** à l'ordre de CLAJ Métabief

Lieu.....

Date.....

Signature

**Par IBAN**

CA FRANCHE-COMTE LES HOPITAUX NEUFS 20071

Intitulé du Compte:

ASSOC. DES CLAJ SAPINS DE L AMITIE RJ

1 RUE DU TELESIEGE 25370 METABIEF

IBAN: FR76 1250 6200 7155 0067 7279 688

Code BIC Code swift: AGRIFRPP825

Notu kiel ĝiro-celon

Comme motif du virement notez:

stage du 13 au 20 août 2016 et votre nomstaĝo de la 13a ĝis la 20 de aŭgustio kaj via nomo.2017-jul-10 17 : 3a [Interŝanĝoj](#) de scioj kaj faroj kaj Esperanto-kurso2017-jul-10 27 : Maratona Esperanto-kurso kun *Perla Mielo, Louis Jeuland* (A)+(B)2017-jul-17 27 : [Renkonto de Alternativoj](#) de ĉiuj specoj kaj koloroj2017-jul-28 aŭg-04 : 17a junula E-renkonto [FESTO](#)2017-aŭg-05 13 : 8a [Festa Semajno](#) por infanoj kaj familioj

2017-aŭg-14 21 : Naskiĝtagdatrevenfestoj de du e-istoj.

2017-aŭg-21 28 : [SOMERAS](#), internacia danco-semajno, pupteatro, Esperanto-kursoj2017-jul-10 17 : 3a [Interŝanĝoj](#) de scioj kaj faroj kaj Esperanto-kurso2017-jul-10 27 : Maratona Esperanto-kurso kun *Perla Mielo, Louis Jeuland* (A)+(B)2017-jul-17 27 : [Renkonto de Alternativoj](#) de ĉiuj specoj kaj koloroj2017-jul-28 aŭg-04 : 17a junula E-renkonto [FESTO](#)2017-aŭg-05 13 : 8a [Festa Semajno](#) por infanoj kaj familioj

2017-aŭg-14 21 : Naskiĝtagdatrevenfestoj de du e-istoj.

2017-aŭg-21 28 : [SOMERAS](#), internacia danco-semajno, pupteatro, Esperanto-kursojKulturdomo de Esperanto  
Kastelo GreziljonoPliaj informoj ĉe: <http://gresillon.org>

# LUMINESKI

27.12.2017 - 03.01.2018

## La silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio

Por nia renkontiĝo ni elektis la urbon Haltern am See (poŝtkodo 45721) en la suda monastera lando. Nia kongresejo estas seminaria domo de la katolik-sindikata movado „KAB” sur la monteto Annaberg en arbaro apud Haltern am See.

La kongresejo estas sufiĉe komforta. Ni loĝos en du-litaj ĉambroj je preskaŭ hotela nivelo kun banĉambro en ĉiuj ĉambroj. Unu-litaj luksaj ĉambroj estas havebla kontraŭ krompago de 15 eŭroj/nokto. Senpaga retaliro (WLAN) haveblas. La repaĝon de la kongresejo vi trovas per [hvhs-haltern.de](http://hvhs-haltern.de)



### Amika tago en la Vogezoj ĉe Dommartin-les-Remiremont

Refoje Ginette proponis al samideanoj de la tri-landa regiono ĝui amikan tagon kun piknikaĵoj. La rendezuo estis la preĝeja parkejo de tiu vilaĝo. Plia propono vizito al la muzeo Terrae Genesis. Jen la raporto pri ĝi kaj pri la organizado fare de Ginette.

Estis dimanĉo, la 25a de junio 2017. Mi ne atendis multe da ĉeestantoj, ĉar mi faris mian programon tro malfrue, sed surprize venis 14 personoj entute: 4 el la Frajburga grupo, 5 el la Mulhouse-grupo kaj 5 el la Gérardmer-grupo.

Mi konfesas, ke la bonŝanco estis kun ni. Unue la vetero, kiu estis nek tro varma nek tro malvarma. Post la infera temperaturo de la lastaj semajnoj en Vogezoj, mi povis timi pluvan aŭ sufokige varman.

En la horo de la rendezuo, la parkejo estis plenplena de veturiloj, ĉar okazis religia ceremonio en la apuda preĝejo. Ni tamen trovis lokojn por niaj veturiloj, profitis viziton al la apuda tombejo, kie la tunoj de granitaj monumentoj sur la tomboj impresas

Post la meso la parkejo estis tute libera por ni.

Pikniko estis sufiĉe komforta, ĉar mi alportiis pliajn faldeblajn tablojn kaj seĝojn. Komprenoble la babiladoj estis tre viglaj, ĉar en la matena grupo ne ĉeestis iu ajn krokodilo (la



du ne-esperantistoj venis posttagmeze). La divido de diversaj manĝoj, la interŝanĝo de receptoj, la ridoj por iu ajn bagatelo estas la aparta etoso de esperantaj piknikoj. Ni tiom multe babilis, ke ne plu restis longega tempo por la plani-

ta piedpromenado, sed ni tamen faris kaj ĝuis ĝin, ĉar ĝi estis sur ebena tereno inter la agrikulturaj kampoj sen-homaj dimanĉe. Ankaŭ por mi tiu piedpromeno estis malkovro, ĉar de tiu vilaĝo mi konis nur la parkejon. Tamen mi elŝutis el Google mapon, kiu tre helpis. Kaj feliĉe, eĉ la negravaj kamparaj vojetoj havas ŝildon kun nomo en tiu afabla vilaĝeto.

Poste, ĉirkaŭ la 14a, ni veturis ĝis la Muzeo Terrae Genesis, 4 km malproksime, en kiu gvidanto atendis nin, sed ankaŭ tri pliaj partoprenantoj.

La muzeo montras tiujn fakojn:

- La iloj kaj kondiĉoj de la metioj pri granito, ĉefe en la pasinteco
- La geologiaj trajtoj kaj lastaj malko-

vroj en nia regiona sub-grundo kaj en la mondo

- Riĉega impresa kolekto da ŝtonoj kaj mineraloj el diversamond-partoj. Vere ni estis kvazaŭ en la trezor-kaverno.

Ni restis pli longe al antaŭvidite, la gvidanto donis amason da detaloj pro persona pasio al tiu muzeo, poste ni rajtis manĝi nian kukon kune surloke, kun tablo kaj benkoj, por fini la renkonton, kaj post la lastaj interkisoj kaj brakumoj, ni disiĝis ĉirkaŭ la 18a, kun kontento pri tiu bela, interesa kaj instruiga tago.



Ginette MARTIN

### Kotizo • Programo Tempo • Teamo

	ĝis 15.08.	ĝis 31.10.	poste
Kotizo*	365	385	399

\*: Necesa antaŭpago por validigi la aliĝon: 50€.

► **La kotizo inkludas** la restadon (loĝado en dulita ĉambro, tri manĝoj tage, programo kaj silvestra bufedo). Unulitaj ĉambroj haveblas po 15 eŭroj por nokto. Ĉiu, kiu loĝas en Germanujo kaj ne estas ordinara membro de GEA/GEJ, krompagas 30 eŭrojn.

#### ► Kiam okazos la renkontiĝo?

La aranĝo komenciĝos je la 27a de decembro kaj daŭros ĝis la 3a de januaro. La organizantoj ŝanĝis la tempon je unu tago, ĉar tio ŝajnas esti pli konvena al la deziroj de la partoprenantoj. Parta partopreno eblas.

#### ► Teamo

Andreas Diemel (ĉeforganizanto)  
Alfred Schubert (tema programo):  
[temaprogramo@luminesk.de](mailto:temaprogramo@luminesk.de)  
Yoshie kaj Dieter Kleemann (gufujoj)  
Sebastian Kirf (teĥnikajoj, repaĝoj)



**Gaja  
 semajnfino  
 2017**
**6a-8a oktobro**
**en Schwäbisch Gmünd**
**la unua ŝtaŭfa\* urbo**


Ĉi-jare la BAVELO-seminario denove okazu en formo de „*Gaja Semajnfino*“, do kun lernado ne laŭ la kutima instruado, sed per ludado, dum promenado, grupa laboro kaj ĉefe multe, multe da interparolado.

Ni proponas buntan kaj varian programon al vi, kiun vi povas pliriĝigi per via propra kontribuo.

Bona loko por tiu programo estas urbo Schwäbisch Gmünd en la valo de rivero Rems, dum nia seminariejo situas sur la altaĵo de apudaj montetoj de Ŝvabia Ĵuraso.

**Gaja semajnfinejo**

(48° 48' 44,8" N, 9° 46' 47,7" O):

Nia ejo estas **Haus Schönblick** (= Bela elrigardo !!!), Willy-Schenk-Str. 9, 73527 Schwäbisch Gmünd, interretejo : [www.schoenblick.de](http://www.schoenblick.de) Ĝi situas



La tereno de la ĝarden-ekspozicio 2014 kaj – en la valo – la urbokerno de Schwäbisch Gmünd

sur la tereno de la baden-virtemberga **ĝarden-ekspozicio de 2014** (vd. la aeran foton)

**Sabate** ni profitas pro la diversaj restantaj allogaĵoj el tiu ekspozicio:

Matene ni vizitos la specialan ĝardenon pri kuracherboj de firmao Weleda (eniro proksimume 9 €).

Eble kun fakula Esperanta-gvidado (ankoraŭ ne certe konfirmata).

Alternativo por niaj sportemuloj:

grimpado aŭ eble eĉ gibonumado en arbaraventurejo (3–20 €, depende de daŭro kaj malfacileco).

Posttagmeze ni promenas tra la arbaro laŭ la vojo „

Himmelsleiter“ suben al Schwäbisch Gmünd.

Apud nia vojo estas globo-vojo, kie ni povas ruligi (kaj postĉasi, ĉu?) ligno-globetojn, kiujn ni mem individue ornamis la antaŭan vesperon. Krome per aro de interesaj tabuloj ni povas ekscii pri la arbaro kaj ties loĝantoj.

Vespermanĝon ni prenos proprakoste en la forumo pri oro kaj arĝento (Gold-und-Silber-Forum – ne timu, la prezoj ne estos tiel altaj). Poste, reheimiĝinte ni origamos (faldos E-stelojn kaj aliajn artverkojn), kantos, aŭskultos, ludos ... Viaj skeĉoj, ŝercoj aŭ similaj kontribuoj estas bonvenaj.

La **dimanĉa** mateno estas libera por mallongaj prelegetoj (po maksimume 20 minutoj), ĉiu partoprenanto povas fariĝi partodonanto



Gibono, majstro de moviĝo en grimp-ĝardenoj




pri temo laŭ propra gusto (ekz-e „Kion mi jam longe volis rakonti al vi“, „Vidu jenan problemon kaj pripensu kun mi“ ...)

Ni finos per komuna manĝado en alia restoracio en la ĉirkaŭaĵo. Por ĉiuj, kiuj ŝatas ankoraŭ komune „postgajiĝi“, tio ankaŭ estas bona elirpunkto por komuna postseminaria entrepreno: ni volas viziti la monaĥejon Lorch (eniro 6 €). Konstruigis ĝin la mezepoka klano de **Ŝtaŭfoj** por havi sekuran, de monaĥoj garditan tombejon (kaj – ĉu eble la vera kaŭzo? - tiel havi rektan eniron en la paradizon).

Hodiaŭ en klostro Lorch prezentiĝas fascina 360°- bildo pentrita de Hans Kloss, kiu montras „la historion de la ŝtaŭfoj“ kun mirindaj detaloj. En la monaĥejo ankaŭ troviĝas la sarkofago (ĉerko) de reĝino „Ireno de Bizanco“ (en sia tempo unu

el la vaste konataj virinoj).

Pliaj eblecoj (presentado de aktivaj rabobirdoj, panoramo de sur Limesgardoturo) troviĝas surloke.



#### Provgustumado:

Kelkminuta flugado trans la tereno de la ĝardenekspozicio:

[www.gmuender-tagespost.de/flug2910](http://www.gmuender-tagespost.de/flug2910)

#### Kostoj por restado en Schönblick:

2 tranoktadoj kaj manĝoj kiel indikite (por ĉiu persono)

en 1-lita ĉambro: 110 €  
 en 2-lita ĉambro: 115 €  
 en 4-lita ĉambro: 90 €

#### Kotizo:

Kotizo: 30 €  
 por junuloj ĝis 30-jaraj: 15 €

#### Aldoniĝas ...

kostoj por vizitoj kaj por eksterdomaj manĝoj (laŭ via elekto)

\* Nia gaja semajnfino okazas en la iama centro de *Ŝtaŭfo-lando*. De kie venas la Ŝtaŭfoj, tre potenca dinastio en la mezepoko, plej grava inter Frederiko la 1a (kromnomita Barbarossa pro sia ruĝa barbo, imperiestro de 1152 – 1190) kaj lia nepo Frederiko la 2a, (naskiĝinta en Sicilio, imperiestro de 1220 – 1250, kromnomita „la mirinda de l' mondo“ pro siaj multaj interesoj kaj scioj kaj impona konduto)

#### Aliĝo

(sendu al: Inge Simon, Brünner Str. 20, 73431Aalen, +49-7361/ 360 615, [Inge.Simon@esperanto.de](mailto:Inge.Simon@esperanto.de))

**O Mi ĝiras \_\_\_\_\_ €** (kotizo + tranoktado) al la BAVELO-Konto

**IBAN:** DE21 6945 0065 0010 4179 22

**BIC:** SOLADES1VSS .

CCP Esperanto France-Est 1997 72 W Nancy

#### Mi kontribuos per:

- prelegeto (dimanĉe matene)
- skeĉo, ŝerco, ludo (vendrede aŭ sabate vespere)

#### Tranoktado en la Gajasemajnfinejo:

- |   |                                  |                                  |
|---|----------------------------------|----------------------------------|
| <input type="checkbox"/> en 1-lita ĉambro | <input type="checkbox"/> ven/sab | <input type="checkbox"/> sab/dim |
| <input type="checkbox"/> en 2-lita ĉambro | <input type="checkbox"/> ven/sab | <input type="checkbox"/> sab/dim |
| <input type="checkbox"/> en 4-lita ĉambro | <input type="checkbox"/> ven/sab | <input type="checkbox"/> sab/dim |

#### Tranoktado en la Gajasemajnfinejo:

- |   |                                  |                                  |
|---|----------------------------------|----------------------------------|
| <input type="checkbox"/> en 1-lita ĉambro | <input type="checkbox"/> ven/sab | <input type="checkbox"/> sab/dim |
| <input type="checkbox"/> en 2-lita ĉambro | <input type="checkbox"/> ven/sab | <input type="checkbox"/> sab/dim |
| <input type="checkbox"/> en 4-lita ĉambro | <input type="checkbox"/> ven/sab | <input type="checkbox"/> sab/dim |

#### Manĝado en la Gajasemajnfinejo:

- |             | vendrede                 | sabate                   | dimanĉe                  |
|-------------|--------------------------|--------------------------|--------------------------|
| matenmanĝo  |                          | <input type="checkbox"/> | <input type="checkbox"/> |
| tagmanĝo    |                          | <input type="checkbox"/> | --☉--                    |
| vespermanĝo | <input type="checkbox"/> | --☉--                    |                          |

--☉-- La manĝoj sabate vespere kaj dimanĉe tagmeze ne okazos en la Gajasemajnfinejo kaj ne estas inkluzivaj en la BAVELO-prezo. - Vi povas elekti laŭ la menu-karto kaj pagi individue.

- Mi volas manĝi vegetare.
- Mi volas manĝi vegane.
- Mi havas alergion kontraŭ \_\_\_\_\_

Nomo, adreso, tel.n-ro retroŝto, subskribo

---



---




---

Aliĝilon bonvolu sendi al:  
[inge.simon@esperanto.de](mailto:inge.simon@esperanto.de)  
 aŭ poŝte al  
 S-ino Inge SIMON,  
 Brünner Str. 20  
 DE-73431AALEN  
 Tel. 00.49-7361/ 360 615,  
 Pagebla per ĝiro al  
 CCP Esperanto France-Est

1997 72 W Nancy  
 per franca ĉeko al Esperanto  
 France-Est  
 sendata al  
 André GROSSMANN  
 5, rue des Pyrénées  
 68390 BALDERSHEIM  
 ret-adreso: [andreo.ag15@sfr.fr](mailto:andreo.ag15@sfr.fr)

# Nia Vilaĝo

*Homo kaj naturo*



En kelkaj n-roj de "Nia Vilaĝo" ni prezentos libron, kiu inspiris multajn naturamikojn. "Valden" (origine: *Walden or Life in the Woods*) grave influis la tre junan kulturon de Usono kaj fariĝis kvazaŭ manifesto de protestantaj gejunuloj kontraŭ la konsumisma okcidenta socio. Verkis ĝin Henry /**Henriko Thoreau** (1817-1862), kiu forlasis socian vivon de urbeto Concord (nuntempe antaŭurbo de Boston, situata ĉe usona bordo de Atlantiko) kaj translokiĝis al arbaro, kiun posedis Ralph W. Emerson, konata eseisto kaj poeto. Tie, apud lago Walden, Thoreau solece "festis" sian 28an jariĝon en julio 1845.




Panoramo de lago Walden, kies bordoj (perimetro) longas je ĉ. 3 kilometroj. Laŭ titolo, oni nomas ĝin nur "lageto" (*Walden Pond*).

Trovinte plaĉan lokon inter la arboj, li konstruis primitivan kabanon kaj loĝis en ĝi dum 26 monatoj (ekde somero 1845 ĝis somero 1847).



Tiel aspektis la originala kabino, rekonstruita post jardekoj. Vizitas ĝin multaj turistoj, precipe en somero.

La kabinon konstruis Thoreau el uzita ligno. Ĝi estis tre malgranda, havis preskaŭ 13 kvadratajn metrojn (3m larĝa kaj 4.5m longa). Interne troviĝis nur bazaj mebloj: lito, tablo kaj tri seĝoj. Antaŭ ol venis vintro, li konstruis ankaŭ kamenon. Ne okupita pri kutima laboro kaj ĉiutagaj devoj, Thoreau havis multegan tempon por observi naturon kaj cerbumi pri teoriaj aspektoj de la vivo. Fruktoj de lia filozofiado aperis libroforme en 18 eseoj.



## "Valden"

(aŭ *Vivo en arbaro*) Parto 1

Tiu ĉi libro ne estas romano, nek strikta aŭtobiografio. Fakte oni povas ĝin trakti kiel kritikon de la okcidenta socio, obsedita per senlima konsumado kaj indiferenta je detruado de la naturo. Videble, ĝia aŭtoro celis provoki siajn legantojn, ke ili reviziu sian vivstilon. Thoreau atentigas pri la neceso kontroli la trudatajn ĉiutage opiniojn kaj vivi pli aŭtentike, sendepende de la modaj tendencoj.



EU-civitanoj Esperanton parolantaj diskutis kun eŭropopolitikistoj Esperanton parolantaj  
Gravaj impulsoj eliris el la komuna kongreso de EEU kaj Germana Esperanto-Asocio 2017

Pentekoste 2017 en Freiburg, Germanio. Vytenis Andriukaitis el Litovio, EU-komisionano pri sekureco de nutraĵoj, d-ro Seán Ó Riain el Irlando, vicambasadoro en Vieno, Ulrich Brandenburg, emerita ambasadoro de Germanio ĉe Nato (Bruselo), en Moskvo kaj en Lisbono, Jozef Reinvar, slovaka diplomato, kaj Zlatko Tišljar el Slovenio, ĝenerala sekretario de EEU - gravaj personoj kontribuis al la sukceso de tiu duobla Esperanto-kongreso.

### **Esperanto-muziko**

Esperanto-muziko beligis la kongreson. La juna rep-regea muzikisto Jonny M el Germanio kaj la grupo „Kaj tiel plu“ el Katalunio prezentis sian arton, unue en moderna kaj poste en popolece katalunia stilo.

### **Emerita ambasadoro estiĝis prezidanto de Germana Esperanto-Asocio**

La ĵus emeritiĝinta ambasadoro Ulrich Brandenburg elektiĝis nova prezidanto de la Germana Esperanto-Asocio. Li estas denaska esperantisto.

### **La kongrestemo paco**

La kongrestemo Paco kaj Milito sufiĉe amplekse kaj profunde okupis la kongresan programaron. Pri ĝi temis la ĉefprelego de Jomo Ipfelkofer sabaton matene. Posttagmeze Jürgen Grässlin, estro de la „Armadinformburoo“ (RIB) en Freiburg, raportis detale pri la armilproduktado en Germanio germanlingve, esperanten interpretite de Ursula Niesert. Poste Alois Eder analizis la kaŝan pormilitan kaj la malkaŝan porarmilan propagandon, kiu uzas la psikologian rimedon de la „signifikadroj de vortoj“ (neŭrolingvistike nomata „framing“). Citaĵo el la juda saĝotradicio: „Atentu pri via vorto, ĝi finfine fariĝos via sorto“.

### **Eŭropa Unio, sukcesa pacoprojekto**

En tuja radioelsendo (podkasto) de „kern.punkto.info“ Johannes Mueller kaj Eva Fitzelová bonvenigis sur la podio du gastojn kompetentajn pri eŭropa politiko: la novbakitan GEA-prezidanton Ulrich Brandenburg, emerita germana ambasadoro, kaj la irlandanon d-ro Seán Ó Riain, vicambasadoro en Vieno. La publiko vigle kundiskutis. Ankaŭ aŭskultantoj el la tuta mondo uzis la eblecon skribi sian opinion, kiun laŭtleĝis la „advokato de la publiko“ Julia Noe. Jozef Reinvar el Slovakio kaj Zlatko Tišljar el Slovenio substekis en la diskutado, kiom gravas edukado por atingi eŭropan identecon. Diskutanto tiucele postulis komisionojn de historiistoj, kiuj harmoniigu la lerneajn historilibrojn nacieme skribitajn.

### **Paco inter religioj**

Paco inter la religioj estas grava fundamento por paco en la mondo. Tiucele lundon antaŭtagmeze okazis podia diskuto inter fideluloj de ses religioj respektive mondkonceptoj: Albrecht Kronenberger, katoliko, Hans Böheim, protestanto, Amina Feder, islamanino, Robert Springmann, bahaano, Manfred Westermayer, budhismo, Wera Blanke, humanisma liberpensulino. Vigle partoprenis en la interŝanĝo de kredoj ankaŭ la publiko. Judino tre interesita troviĝis inter la diskutanta publiko.

### **Esperanto en lernejoj**

La Esperanto-Ligo de Baden-Württemberg (BAVELO) decidis entrepreni fortostreĉon, por konatigi Esperanton en la lernejoj. Minimume ĉiu lernanto unufoje dum sia lerneja kariero aŭdu pri Esperanto. Nur se li aŭ ŝi scias pri Esperanto, eblas al li aŭ ŝi decidi por lerni la lingvon propravole, ekzemple per interreta kurso.

### **Esperanto-libroj**

La riĉa libroservo ankaŭ entenis Esperanto-lernolibrojn por turkoj kaj por araboj. Ĉu Esperanto iam estos rimedo por integriĝo?

Alois Eder



## Esperanto: 94-a GEA Kongreso en Freiburg

La 94-a Germana Esperanto-Kongreso okazis ĉijare en Freiburg (Frajburgo) de la 2-a ĝis la 5-a de junio. Ĉifoje la kongreso havis tre specialan aspekton : ĝi okazis en kunlaboro kun Eŭropa Esperanto-Unio EEU.

Sabate, la 3-an de junio , EEU organizis Eŭropan konferencon omaĝe al Ludoviko L. Zamenhof, memore al la morto antaŭ 100 jaroj la 14-an de aprilo 1917. La prezidanto de EEU, Seán Ó Riain (irlanda ambasadoro) bonvenigis 3 ĉefajn parolantojn, nome S-ron VYTENIS ANDRIUKAITIS, komisionano de EU, S-ron ULRICH BRANDENBURG (em. germana ambasadoro) kaj S-ron JOSEF REINVART, altranga slovaka diplomato .

S-ro Adriukaitis prezentis Zamenhof kiel antaŭulo de Homaj Rajtoj ;

S-ro Brandenburg parolis pri la situacio de lingvoj en Eŭropa Unio kaj S-ro Reinvart atentigis, ke la aktiveco de Zamenhof estis grava inspiro por la lingvo-politika laboro de Slovakio en la pasintaj jaroj .

La ĝenerala diskuto traktis la gravecon por nuna kaj estonta EU-lingvopolitiko.

La dua ĉeftemo dum la kongreso estis la malfacila situacio en la organizo de GEA pro la subita grava malsaniĝo de la ĝisnuna prezidanto Sebastian Kirf.

Dum la jarĉefkunveno finfine estis solvo: S-ro Ulrich Brandenburg akceptis la taskon esti la nova prezidanto de GEA .

La vesperaj distraĵoj estis tre variaj. Vendrede vespere kantis en junulara stilo JONNY M. kaj sabate koncertis sepkapa "bando" el Katalunio. Ili regas multajn instru-



mentojn kaj prezentis muzik-tradicion de la ibera duoninsulo.

Preskaŭ senfina aplaŭdo adiaŭis ilin malfru-vespere.

Dimanĉe posttagmeze multaj kongresanoj malaperis pro ekskursoj al la bela natura ĉirkaŭaĵo de la kongresurbo aŭ al specialaj vidindaĵoj en la urbocentro de Frajburgo. La pli ol 150 partoprenantoj el 13 landoj certe ĝuis la kongreson.


Dieter Kleemann



Aŭtune 2015 ni havis la eblon viziti Baraton. Kun grupo de nepalaj esperantistoj ni vojaĝis al Srilanko por partopreni la 3-an Azian Seminarion en *Katunayake* de la 31-a de oktobro ĝis la 4-a de novembro.



De Parizo ni flugis per *AIRBUS A-380 Emirates* al *Dubai*, kie ni ŝanĝis aviadilon por daŭrigi al Katmanduo, kie ni restis tri tagojn. Poste ni



Barato. Tie

daŭrigis kun kelkaj esperantistoj per buseto al sudokcidenta parto de Nepalo ĝis la landlimo kun ni renkontiĝis kun



aliaj nepalanoj por komune busvojaĝi al la urbo *Gorakhpur*. Ni atingis ĝin vespere kaj rapide trovis hotelon por tranokti. En la urbo ni restis du tagojn kaj iom supraĵe trarigardis ĝin.



## VOJAĜADO TRA BARATO - 2015

Por atingi la urbon Ĉenajo en la sudo ni uzis trajnon. La vojaĝo

daŭris iom pli ol du tagojn, entute 66 horojn. Antaŭ ol aviadiliĝi por flugi



al Srilanko, ni iom promenis en la urbo. Post unu semajna restado en Srilanko



ni frumatene revenis al la sama loko en Ĉenajo kaj posttagmeze ni plu veturis per trajno al Kolkato. Tien ni alvenis noktomeze post 32 hora veturado.

Ni aspektis simile, kiel iu barata purigisto. La sekvan tagon ni jam estis pretaj por malkovri la urbon. En Kolkato ni havis iom pli ol du liberajn tagojn por viziti ĝin. La lasta etapo de nia aventuro gvidis nin per nokta trajno de Kolkato ĝis la nepala landlimo.



Entute ni pasigis proksimume 110 horojn en la trajno vojaĝante 4334 kilometrojn tra Barato de nordo ĝis sudo kaj reen nordorienten.







Por longaj distancoj en Barato la trajnoj estas la plej bona vojaĝrimedo. Homoj kutime vojaĝas por viziti familianoj okaze de festoj, naskiĝoj aŭ funebroj.

La trajno estas por la tuta Barato tre necesa. Ĝi transportas milionojn da pasaĝeroj ĉiutage. Vojoj por aŭtomobiloj ĝenerale ne estas en bona stato, transporto per aviadilo multe kostas kaj piede ne eblas iri longajn distancojn. La ŝtate prizorgata fervojo en Barato estas la plej ampleksa en la mondo. Ĉiutage estas transportitaj ĉirkaŭ 19 milionoj da



pasaĝeroj kaj pli ol du milionoj da varoj. Ĉe la fervojo laboras preskaŭ du milionoj da homoj.

La unua fervojlinio en Hindio estis konstruita de angloj en la jaro 1853. Ĝia longo estis 34 kilometroj de *Bombay* (nuntempe *Mumbai*) ĝis *Thane*. En la jaro



1947 estis en la teritorio pli ol 40 fervojaj organizoj. En la jaro 1951 ili kuniĝis en tutnacia ŝtatprizorgita sistemo - *Indian Railways*. Nuntempe la trajnreto ampleksas 108 706 km. Ĉiutage aldoniĝas pluraj km da novaj reloj.



Ĝis la jaro 1900 hinda trafiko estis la kvina plej granda en la mondo. En la jaro 1862 estis

konstruita la unua duetaĝa trajno en la mondo. Ĉenajo (*Chennai* antaŭe *Madras*) kiu, havante pli ol 6 milionoj da homoj estas la kvara plej granda urbo de Barato, havis la unuan dentrelan fervojon.



Ekde la jaro 1895 Hindio komencis konstrui siajn proprajn lokomotivojn.

Fervojo kondukas tra tuta Barato, krom almtontaraj regionoj. Tre densa trafiko estas en la norda parto inter la urbegoj *New Delhi* kaj *Kolkata*. La reto estas dividita en 17 zonoj kun 7 000 haltejoj kaj stacidomoj. Multaj vojtrako estas elektrizitaj. Trajnoj estas tre longaj.



Rapideco estas limigita inter 75 kaj 160 km/hore.

Ekzistas tri dimensioj de ŝpuroj. En Barato oni uzas precipe larĝŝpurajn trakojn (1676 mm). Ĝia avantaĝo estas stabileco de vagonoj kaj lokomotivoj kaj granda transporta kapacito. Vagonoj estas pli larĝaj. Malfavoras pli alta konstrukosto kaj pli longaj kurbiĝoj.



Tiu tre ampleksa reto havas grandan stokon da vagonoj kaj lokomotivoj. Barataj fervojoj posedas 8 500 lokomotivojn, plejparte dizelaj. Elektraj estas je 25kV alterna, malpligranda kvanto je 1,5kV kontinua kurentoj. Vaporlokomotivoj servas nur por historiaj aŭ kulturaj eventoj. Barataj fervojoj posedas 63 000 vagonojn por pasaĝera transporto kaj pli ol 211 800 diverstipajn ŝarĝvagonojn.



Internaciaj trajnoj en Barato estas malpli uzataj ol en Eŭropo. Praktike ili finas vojaĝon ĉe la limo kaj la pasaĝeroj devas transiri al trajno de apuda koncerna lando - ekzemple Pakistano. Inter Barato kaj Nepalo funkcias nur du trajnlinioj inter la pasejoj *Raxaul-Sirsiya* kaj *Jaynagar-Khajuri*. Unu vojo estas grandŝpura, alia etŝpura. Nepalo praktike ne havas fervojon, do la kunigo kun Barato ne estas grava.

En Barato estas bona rezerviga sistemo. Ekzistas ĉiuspecaj trajnoj kaj pluraj vagonkategorioj por vojaĝantoj: luksaj kaj mizeraj, eĉ eblas veturadi sur trajntegmento



Vagonoj en pli malalta kategorio kun kuŝlokoj ne estas klimatizitaj. Aero trafluas malfermeblajn fenestrojn kun kradoj. Gigantaj ventumiloj fiksitaj sub la plafono mildigas la varmegon. Vagonoj konsistas el malfermitaj kupeoj, sen divido ĉe pasejo. En ĉiu kupeo estas tri kuŝlokoj superlokitaĵe ĉe ĉiu flanko. Dum la tago pasaĝeroj faldas la mezan kuŝlokon. Ĝi servas kiel dorsapogilo por tri pasaĝeroj de la suba, meza kaj supra loko. Fojfoje oni sidas tie pli multope (lokuloj estas malgrandaj kaj sveltaj). Ĉe la koridoro estas nur du niveloj de kuŝlokoj. La supra kuŝloko ne faldiĝas kaj oni povas uzi ĝin tage por ripozi aŭ meti valizojn. Per ŝtupareto oni supreniras al ĝi, sed vidi eksteren neblas kaj eĉ dum la tago la loko estas malhela. Ĉiu kupeo havas du fenestrojn de ekstere



protektitajn per kradoj por malebligi al la vojaĝantoj eniri tra ili. Tio povus okazi en stacidomoj, kie multegaj homoj amasiĝas. Kradoj estas ankaŭ bonaj protektiloj kontraŭ ŝtelistoj. Nokte oni povas fermi la fenestron, tamen trablovas la vento. Same kiel la fenestroj, la tuta vagono estas tre malpura. Dum la tago eblas rigardi la ĉiumomente ŝanĝiĝantan pejzaĝon aŭ alimaniere amuziĝi. Tra la fenestro aŭ tra la preskaŭ ĉiam malfermita pordo la homoj



ĵetas paper-glasojn, plastajn botelojn, manĝtelerojn kaj ĉiujn aliajn malpuraĵojn, el kio profitas vagantaj bestoj inter la reloj. Rubujoj troviĝas nur en haltejoj. Ĉe ĉiu flanko de la vagono estas du necesejoj. Unu tipe barata kun truoj en la planko kaj la alia tipe eŭropa - sidloka. Sed ili ambaŭ estas ege malpuraj kaj krome mankas necesejpapero. Problemo okazas, se mankas akvo dum longa vojaĝo... Apud la ekstera pordo troviĝas malgranda lavujo kaj spegulo. Oni devas atenti pri siaj valizoj. Pasaĝeroj ilin ligas per ĉenoj sub la suba kuŝloko. Dum la vojaĝo oni povas aĉeti en la trajno multajn aĵojn. Krom trinkaĵoj, fruktoj, nuksoj kaj aliaj manĝaĵetoj venas vendistoj kun legaĵoj, ŝtofoj, ornamaĵoj, religiaĵoj. Foje pasas almozuloj aŭ handikapitaj personoj kaj ankaŭ knaboj purigante la plankon deziras ricevi iom da mono. Kontrolisto ne tre ofte pasas.



Oni devas atenti pri siaj valizoj. Pasaĝeroj ilin ligas per ĉenoj sub la suba kuŝloko. Dum la vojaĝo oni povas aĉeti en la trajno multajn aĵojn. Krom trinkaĵoj, fruktoj, nuksoj kaj aliaj manĝaĵetoj venas vendistoj kun legaĵoj, ŝtofoj, ornamaĵoj, religiaĵoj. Foje pasas almozuloj aŭ handikapitaj personoj kaj ankaŭ knaboj purigante la plankon deziras ricevi iom da mono. Kontrolisto ne tre ofte pasas.

Trajnveturado en Barato povas esti ankaŭ danĝera. Okazas oftaj akcidentoj. Dumjare miloj da homoj perdas la vivon. Ofte ili endanĝerigas sian vivon, alsaltante la trajnon dum veturado kaj sidante aŭ starante ĉe malfermitaj pordoj. En Barato estas trajnlinioj, kie la homoj vojaĝas sur la tegmento de la trajno aŭ pendas kiel vingrapolo alkroĉitaj ĉe malfermitaj pordoj kaj fenestroj. Por eŭropanoj tio estas neimagebla frenezaĵo kaj reale tre granda danĝero.



Trajnveturado en Barato povas esti ankaŭ danĝera. Okazas oftaj akcidentoj. Dumjare miloj da homoj perdas la vivon. Ofte ili endanĝerigas sian vivon, alsaltante la trajnon dum veturado kaj sidante aŭ starante ĉe malfermitaj pordoj. En Barato estas trajnlinioj, kie la homoj vojaĝas sur la tegmento de la trajno aŭ pendas kiel vingrapolo alkroĉitaj ĉe malfermitaj pordoj kaj fenestroj. Por eŭropanoj tio estas neimagebla frenezaĵo kaj reale tre granda danĝero.

En Barato estas trajnlinioj, kie la homoj vojaĝas sur la tegmento de la trajno aŭ pendas kiel vingrapolo alkroĉitaj ĉe malfermitaj pordoj kaj fenestroj. Por eŭropanoj tio estas neimagebla frenezaĵo kaj reale tre granda danĝero.





Inter la reloj ofte libere promenadas ne nur homoj, sed ankaŭ diversaj bestoj. Ne estas raraĵo vidi bovinojn, hundojn kaprinojn, kaj eĉ simiojn.



Foje la bestoj eniras la stacidomon, kvazaŭ ankaŭ ili dezirus vojaĝi. Kutime vilaĝoj situas tuj apud la trajnlinioj, sen iu ajn protekta barilo. Do, aliro al reloj estas tute libera. Ofte en la proksimeco troviĝas kortbirdoj, porkoj kaj aliaj hejmbestoj. Krome ĉie estas amaso da rubaĵoj. Transpasejoj estas protektataj per simplaj bariloj, tamen iuj trafikantoj antaŭeniras ne konsciante pri danĝero.



Ĉe la trajnvojoj laboristoj faras diversajn, necesajn riparojn kaj virinoj lavas kaj sekigas vestaĵojn.

Ĉe la trajnvojoj laboristoj faras diversajn, necesajn riparojn kaj virinoj lavas kaj sekigas vestaĵojn.



Tre ofte ĉe iuj stacidomoj vojaĝantoj malpacienas kaj anstataŭ ol uzi supran pasejon por trairi al alia kajo aŭ al stacidoma halo, ili trairas la trakon por supreniri kajojn. Tion faras eĉ virinoj bele vestitaj en sarioj. Tiu ago povas esti tre danĝera. Ankaŭ purigistinoj eniras la trajnvojojn kaj lastmomente forlasas ĝin antaŭ ĵus alvenanta trajno.

Tre ofte ĉe iuj stacidomoj vojaĝantoj malpacienas kaj anstataŭ ol uzi supran pasejon por trairi al alia kajo aŭ al stacidoma halo, ili trairas la trakon por supreniri kajojn. Tion faras eĉ virinoj bele vestitaj en sarioj. Tiu ago povas esti tre danĝera. Ankaŭ purigistinoj eniras la trajnvojojn kaj lastmomente forlasas ĝin antaŭ ĵus alvenanta trajno.

**Vojaĝi en Barato per trajno estas granda kaj neforgesebla aventuro!**





Nia Foto-paĝo montras kion la esperantistoj surmetas sur siajn sakojn okaze de kongresoj aŭ de turismado  
Fotoj de Korine

